



Esperanto *en Danio*

30-a jarkolekto • n-ro 3 • aŭgusto 2023



Esperanto en Danio

membroorgano de
Dana Esperanto-Asocio

ISSN 0909-6124

Adreso de la prezidanto:

Peter Wraae
Eremitageparken 17 st, C
2800 Lyngby
☎ 60 70 79 69 peter@wraae.dk

Ĝirokonto de DEA: 8411-41 88 386

UEA-kodo: deaa-t

Kromaj estraranoj:

Finn Østerbæk (kasisto)
Ileana Schrøder (vicprezidanto)
Jens S. Larsen (sekretario)
Bent Jensenius
Pia Wettergren

Redakcia adreso:

Jens S. Larsen
c/o Trillingsgård, Munkebjergvej 77
2770 Kastrup
☎ 52 64 44 72 eed@esperanto.dk

Presado:

Atlas-Quick

Adresŝanĝoj al:

Finn Østerbæk ☎ 24 96 04 45
finnoesterbaek@gmail.com

Represo de artikoloj el EeD estas
permesata kun indiko de la fonto.

Limdato por la venonta numero:

01.11.2023

Enhavo

Agado ĉe eŭropaj parlamentanoj.....	3
Pri la antaŭkongreso de UK.....	6
Kopenhago.....	8
Tove Skutnabb-Kangas ne plu inter ni.....	9
Biblioteko Hodler transdonita.....	10
Afrikanoj en Torino.....	13
Kerna UN-laborgrupo pri lingvoj.....	14
100-a Germana Esperanto-Kongreso.....	16
Novaj Honoraj Membroj de UEA.....	19
UEA ricevis EU-subvencion.....	22
Rezolucio de la 108-a UK.....	24
Ĵurnalista seminario en Litovio.....	25

Agado ĉe eŭropaj parlamentanoj

La 9-a de majo oni festas la tagon de Eŭropo. La gvidanto de la Eŭropa komisiono de UEA Renato Corsetti, kies membro mi estas, invitis la komisionanojn partopreni la feston per mesaĝo al la eŭropaj parlamentanoj. Mi sendis la suban mesaĝon tradukitan dane, al niaj danaj parlamentanoj:

Kære Medlem af Europa-Parlamentet

I slutningen af 2022 fremsatte en gruppe af eksperter i sprogpolitiske spørgsmål en officiel rapport til Research for CULT Committee – *The European Union’s approach to multilingualism in its own communication policy* (europa.eu).

Rapporten viser, at de fleste sider på Europa-Kommissionen og den Europæiske Centralbanks hjemmesider, såvel som de EU-styrelser og agenturers hjemmesider kun kan tilgås på engelsk. Det er ofte sider der indeholder vigtige oplysninger for borgere, virksomheder eller medlemsstater. Denne situation forårsager diskrimination og ulighed, for ifølge Eurostats “Undersøgelse om Voksenuddannelse” (AES) angiver kun 13% af Europas befolkning, at de behersker dette sprog som fremmedsprog, eller at de taler det som modersmål. Det er et stort problem for sprogligt demokrati. EU's hjemmeside er for nærværende det vigtigste redskab for borgere der søger oplysning om EU.

Denne rapport indeholder 5 anbefalinger, men den mest hastende, som kan gennemføres med det samme, er følgende:

Opret en “funktionær for flersprogethed” til at undersøge praksisser, sprogordninger og sprogpolitikker inden for kommunikation på internettet og fremstille en rapport om disse emner.

Sådanne funktionærer findes allerede hos de Forenede Nationer, i Canada og Svejts, og er en stor hjælp i den konkrete gennemførelse af pligterne med hensyn til flersprogethed og reelt

flersproget kommunikation med borgerne. Uden en strammere kontrol af dets pligt til flersprogethed, vil den europæiske administrative struktur altid befinde sig længere væk fra de europæiske borgere.

Det er en hastesag, for den europæiske flersprogethed lider og ensretningen med engelsk går frem dag for dag. Derfor anmoder vi om Deres støtte til at gennemføre denne anbefaling hurtigst muligt.

Mange tak for at tage sagen i betragtning.

Jen la reago de 6 el la 14 danaj parlamentanoj kiuj respondis:

Kære Ileana Schrøder.

Tak for din henvendelse!

Jeg beklager den sløve svartid, men der har været tryk på kedlerne i Bruxelles.

Først og fremmest tak for din henvendelse angående tilgængeligheden af EU's hjemmesider og flersproget kommunikation.

Det er korrekt, at EU's hjemmesider primært er tilgængelige på engelsk, og dette kan skabe en følelse af ulighed for de borgere, der ikke behersker sproget. Flersprogethed er en af de smukke ting ved Europa. Derfor er det vigtigt at sikre, at alle borgere kan få adgang til information og ressourcer på deres foretrukne sprog.

Du skal derfor have tak for at gøre mig opmærksom på problemstillingen. Samtidig må vi dog se i øjnene, at der kan være begrænsninger og udfordringer i forhold til ressourcer og kapacitet til at opretholde en omfattende flersproget tilgang på alle EU-hjemmesider.

Man skal derfor finde en afbalanceret løsning, hvor der tages hensyn til behovet for flersprogethed og de praktiske begrænsninger.

Hav en god dag.

Best regards / med venlig hilsen

Morten Løkkegaard.

Kære Ileana Schrøder

Christel Schaldemose takker mange gange for din mail. Vi kigger på det ved given lejlighed, hvor flersprogspolitikken diskuteres.

Med venlig hilsen

Ann Braarup CUYKENS

Administrative assistant to head of delegation MEP Christel
SCHALDEMOSE

Kære Ileana

Mange tak for jeres mail og jeres forslag.

Jeg har orienteret Bergur Løkke Rasmussen og den politiske rådgiver på området.

Vi ønsker jer en god dag!

Bedste hilsner,

Dana Fahoum

Kære Ileana

Mange tak for din henvendelse.

Det er naturligvis noget der ligger os på sinde hos DF i Europa-Parlamentet.

Vi er opmærksomme på sagen, både for nu og ved fremtidige afstemninger.

Jesper Groth Sogaard | Head of Office | MEP Vistisen

Kære Ileana,

Tak for mailen og for at rejse det. Det er godt nok for dårligt, at al info ikke ligger på de forskellige sprog. Det troede jeg faktisk, det skulle.

Jeg sidder ikke i CULT, men giver din besked videre til mine kolleger i udvalget.

Derudover kan I overveje at tage fat i de danske tolke i EU – de har helt sikkert også en masse holdninger og viden om emnet.

Bh Kira Marie Peter-Hansen

—

Kære Ileana,

Tak for din email.

Det er vigtigt, at de europæiske borgere kan følge med.

Margretes kontor har dog desværre ikke ressourcer til at gå ind i flere sager i øjeblikket.

Med venlig hilsen

Rikke Lauritsen

Assistant to Margrete Auken

SF in the Greens/EFA, European Parliament

Kopenhago

Kunvenoj de Konversacia Esperanto-Klubo

Ni kunvenas en Carit Etlars vej 6, 1814 Frederiksberg C, en la kelo dufoje en la monato – ĝenerale la unuan kaj trian lundojn. Ĉiuj estas bonvenaj

4. septembro je la 19-a horo: Ni rakontas pri niaj someraj ferioj.

Precipe partoprenantoj en la UK en Torino rakontas. Verŝajne ni spektas videon el la kongreso.

18. septembro je la 19-a horo: Ĉu Harald Bludentulo estis falsisto?

Jens S. Larsen rakontas pri Harald Blåtand. En Jelling, Jutlando, staras la du famaj runŝtonoj, sur kiuj la nomo *Danmark* estis unuafoje menciita en Danio mem. La granda ankaŭ bildigas Kriston, kaj tiu bildo troviĝas en ĉiuj danaj pasportoj. Tial estas sufiĉe interese ke la malgranda runŝtono de Jelling ŝajne estas falsaĵo – farita de reĝo Harald Bludentulo, kiu vere starigis la grandan runŝtonon. En ĉi tiu prelego mi resumos kiel la historiistoj ĝis nun interpretis la misteron kaj mem prezentos novan teorion.

2. oktobro je la 19-a horo: Esperantaj famuloj

Ni vidas du filmojn (el Australio kaj Pollando)

16. oktobro je la 19-a horo: Lumbildprelego pri vizito en Brazilo

Bent vizitis tiun interesan landon en septembro/oktobro 2019. Mi komencis tiun prelegon dum la korona pandemio sed devis ĉesi post 30 minutoj.

6. novembro je la 19-a horo: Babila vespero

Rakontu pri libro kiun vi legis aŭ filmo kiun vi spektis, kiujn vi povas rekomendi aŭ malrekomendi al la aliaj. Alternative kunportu objekton kaj rakontu pri ĝi.

20. novembro je la 19-a horo: Muzikvespero

Hans Christian Frank kantas ktp. Muzikkvizo tra la ĝenroj. Prezento de la unua opero originale verkita en Esperanto.

4. decembro je la 19-a horo: Nostalgia vojaĝo

Ni vidas kaj diskutas bildojn el la fotoalbumo de de Bodil kaj Gustav Kühlmann kun rimarkoj de Margrethe Noll.. Vere interesaj fotoj ekde 1908 ĝis 1966. Bona bazo por diskutoj. (La albumo nun troviĝas en la Esperanto-Muzeo en Vieno). Ni vidos interalie bildojn de Zamenhof en Kopenhago.

Ekstera agado:

En la centro de Ballerup okazos dum la semajnfino 18-20 de aŭgusto *Ballerup Musikfest*, ke KEK havos budon.

Vendrede 13-an de oktobro ekde la 18-a horo KEK partoprenos la Kulturalan Nokton. Ni prezentos nin mem kaj Esperanton en nia kunvenejo en Carl Etlars Vej.

Pri la antaŭkongreso de UK



Al la Antaŭkongreso de UK en Torino aliĝis entute 31 personoj. Unu el Japanio, sep el Germanio, ok el Koreio, du el Hungario, kvar el Usono, du el Hispanio, unu el Meksiko, du el Brazilio, unu el Francio, unu el Britio kaj du el Danio. Do, la grupo bone montris la internaciecon kiun oni trovas en Esperantujo. Al la ĉefa kongreso aliĝis 1210 personoj el 69 landoj.

La antaŭkongreso komenciĝis en Romo, la 24-an de junio, kvin tagojn antaŭ UK. Ni estis enloĝigitaj en bona hotelo, kaj la programo komen-

ciĝis la venontan tagon. La unuan tagon temis pri la Vatikana urbo kaj la baroka Romo. Ni atingis la Placon de Sankta Petro, kiu estas koro de la Katolika Eklezio. La Vatikana ŝtato estas la sidejo de la Papo, kaj en ĝi troviĝas arkitekturaj verkoj unikaj en la mondo. Post la tagmanĝo en loka restoracio estis varmege, sed malgraŭ tio ni sukcesis vidi kelkajn fontanojn, la Hispanan Ŝtuparon, Panteonon kaj kelkajn templojn. La ĉiĉeronado daŭris naŭ horojn kaj post la reveno al la hotelo ni ĉiuj tuj duŝis nin.

La duan tagon temis pri antikva Romo kaj unue ni vidis la gigantan Koloseon, la plej grandan amfiteatron de la mondo. Ĉie ajn en Romo oni trovas restaĵojn de temploj kaj preĝejoj kiuj estis tre impresaj. Ni sentis nin en tute alia mondo, kaj estas facile kompreni kial la antikvaj urboj en Italio estas tiel allogaj por turistoj.

Frue matene, la trian tagon, ni iris per aŭtobuso al Florenco, kaj survoje haltis en Sieno por rigardi la majestan katedralon. Ĵus antaŭ ol atingi Florencon ni haltis ĉe farma korto aŭ panoramejo Piazza Michelangelo, kiun Giuseppe Poggi planis kaj desegnis en 1869. El tiu loko oni havis belan panoramon super la pliparto de Florenco kaj la rivero Arno. Ni ne vere komprenis kiamaniere la iamaj italoj povis konstrui tiel multe da abunde ornamitaj preĝejoj, katedraloj, palacoj kaj kortoj.

Florenco estis centro por la Renesanco en la itala historio. La urbo esprimas sian tutan belecon danke al verkoj de Giotto, Donatello, Michelangelo, Brunelleschi, Botticelli kaj Leonardo da Vinci. Post la tagmanĝo ni vizitis la bazilikon de Sankta Laŭrenco, kiu entenas la kapelojn de la fama familio Medici. La finan tagon de la ekskurso ni iris al Pizo kie ni kompreneble vizitis la katedralon Santa Maria Assunta kun la kliniĝanta sonorilturo, la “Turo de Pizo”. Je la fino de la kvina tago ni atingis Torinon, kie la 108-a Universala Kongreso okazis.

La manĝoj donis al ni bonan okazon starigi pli proksimajn rilatojn kun la aliaj ekskursanoj. Laŭ itala tradicio oni ricevas tri aŭ kvar pladojn ĉe

tag- kaj vespermanĝoj. Tio donis a ni bonan tempon paroli kune kun la aliaj partoprenantoj ĉar la manĝoj ofte daŭris horon kaj duonon.

Entute tre interesa kaj varma ekskurso.

Peter Wraae

Tove Skutnabb-Kangas ne plu inter ni



Mia lasta mesaĝ-interŝanĝo kun Tove Skutnabb-Kangas okazis la 28-an de majo, kiam mi respondis ŝian mesaĝon de la 27-a de majo.

Hodiaŭ (31an de majo 2023) mi reskribis al ŝi por peti ŝian konsenton/ konfirmon pri la aperigo de aldonita frazo, proponita de ŝi por paĝo de ŝia retejo, kiun mi kreis por ŝi en 2008, okaze de nia Simpozio pri lingvaj rajtoj, organizita ĉe UN en Ĝenevo fare de

Charmian Common kaj mi mem. Forsendinte la mesaĝon mi pensis, ke mi certe tre baldaŭ havos ŝian respondon (kiel kutime).

Atendante, mi komencis krei guglan averton pri apero de ŝia nomo en publikaĵoj, kiel mi jam havas aliajn pri ‘lingvaj rajtoj’, ‘esperanto’, ktp. Apenaŭ mi finis la mendon de la nova averto, mi ekvidis parte legeblan komencon de artikolo, mencianta ŝian forpason la 29-an de majo...

Mi ne kredis al miaj okuloj, antaŭ ol malfermi la ligan.

Bedaurinde, ni perdis tre gravan personon, kiu per sia humanismo, subteno de, kaj lukto por, lingvaj rajtoj por ĉiuj, de socie justa lingva komunikado, multe kontribuis al la batalo kontraŭ la hegemonio de tiel nomataj “grandaj” lingvoj, kaj kiu estis signifa apoganto de la Esperanto-movado, de niaj klopodoj por lingvaj rajtoj en interpopola komunikado.

Grandan dankon, Tove!

Ni pluportos vian laboron, ni valorigos viajn publikaĵojn, kies plimulto troveblas en via retejo: www.tove-skutnabb-kangas.org/

Kunsente iras miaj pensoj ankau al Dr. Robert Phillipson, edzo de Tove, kaj aliaj familianoj.

Stefano Keller

Biblioteko Hodler transdonita

Lundon, la 29-an de majo 2023, okazis speciala ceremonio en la *Biblioteka Narodowa* por celebri la transdonon de la kolekto Biblioteko Hector Hodler, iniciatita lianome post lia frua forpaso en 1920. Ekde 1955 tiu kolekto trovis sian hejmon en Roterdamo, en la Centra Oficejo de UEA. Pro tio ke ni havis nek adekvatan konservadon nek profesion bibliotekiston por prizorgi la kolekton, UEA serĉis taŭgan lokon por ĝia nova prizorgado pro la decido ne plu okupi la domon en Nederlando.

Post longa priesplorado, dank' al iniciatoj de eksprezidanto de UEA Mark Fettes kaj membro de nia Financa Komisiono Pascal Dubourg Glatigny, kunlabore kun prezidanto Duncan Charters, Ĝenerala Direktoro Martin Schäffer kaj stabanoj de la Centra Oficejo, ni sukcesis aranĝi pri transdono al institucio kiu plenkore interesiĝis ricevi la kolekton. En la katalogo de la Pola Nacia Biblioteko jam enestis pli ol mil libroj en Esperanto.



Unu el la montrofenestroj en la ekspozicio aranĝita de la Nacia Biblioteko (foto Biblioteka Narodowa)

Jam en la pasinta jaro estis aranĝita la transdono de la arkivoj de UEA al la Esperanto-Muzeo de la Aŭstra Nacia Biblioteko en Vieno (ÖNB), kaj harmonie kunlaboris la du bibliotekoj por faciligi la novan aranĝon. Ambaŭ prizorgis la transportadon senkoste al UEA.

La *Biblioteka Narodowa* ne nur prizorgos la konservadon de la kolekto kaj daŭran ciferecigadon de partoj de la enhavo, same kiel ÖNB, sed ĵus anoncis la dungon de Esperanto-parolanta kuratoro de la kolekto, Gabriela Skonieczna. La kolekto estos alirebla de esploristoj kaj de la publiko kaj uzebla ĉeeste kaj rete de ĉiuj posedantoj de senpaga biblioteka karto.

La ceremonio okazis en la Aŭditorio Stefan Demby de la Biblioteko. Ĝi daŭris proksimume 30 minutojn, kun alparolo de Biblioteka Direktoro D-ro Tomasz Makowski, la Pola Ministro pri Kulturo kaj Nacia Heredaĵo kaj Vica Ĉefministro profesoro Piotr Gliński, mem naskiĝinta en familio de esperantistoj, kaj prezidanto de UEA Duncan Charters, ŝarĝita pri la oficiala transdono de la Biblioteko Hector Hodler al la Pola Nacia Biblioteko. Oni uzis la polan, anglan kaj Esperantan lingvojn, kun interpretado de Rafał Darasz.



Post la ceremonio okazis akcepto kun regalo. Sekve komenciĝis simpozio pri la signifo de la kolekto por la Biblioteko kaj esploristoj pri

Esperanto. Esstis rondo de kvar prezentaĵoj en la angla kaj pola por ĉeestantaj oficialaj gastoj, esploristoj, kaj la publiko, kun skribitaj trilingvaj resumoj, kaj spaco por demandoj kaj respondoj, nature ankaŭ en Esperanto:

Bonvenigo kaj Saluto: Julia Konopka-Żołnierczuk (Vicdirektorino, *Biblioteka Narodowa*);

Gvidado: D-ro Pascal Dubourg Glatigny (CNRS, Parizo) kaj Gabriela Skonieczna (*Biblioteka Narodowa*).

1. Prof. Pascal Dubourg Glatigny (CNRS, Parizo) en la angla:

La defio de konservado de transnacia heredaĵo, la futuro de kolekto Hector Hodler.

2. D-ro Ida Stria (*Uniwersytet Warszawski*) en la pola:

Havebleco de Esperantaj bibliotekaj kolektoj el lingvistikaperspektivo

3. Prof. Denis Eckert (*Géographie-cités*, Parizo / *Centre Marc Bloch*, Berlino) en la angla:

Varsovio kiel deirpunkto por la disvastigo de lingvo internacia: La unuaj Esperanto-lernolibroj kaj vortaroj kaj iliaj aŭtoroj (1887-1890)

4. Prof. Marek Nahajowski (*Akademia Muzyczna w Łodzi*) en la pola:

Esperanto kaj muziksciencoj – la nuna stato kaj perspektivoj por plua disvolviĝo.

La Biblioteko bonvenigas deziras atesti la rehejmiĝon de signifa parto de nia unika kultura heredaĵo en la lando de la naskiĝo de la lingvo iniciatita de d-ro Zamenhof.

Afrikanoj en Torino

Ankaŭ ĉi-jare la tradicia afrika kunveno dum UK okazis hibride en la 1-a de aŭgusto. Partoprenis la kunvenon ĉeeste trideko da kongresanoj kaj ankaŭ homoj defore. Dum pli ol horo estis vicaj atestoj fare de gemikoj de Afriko subtenantaj projektojn en la kontinento, salutvortoj al la kunveno. Citindas tiu de s-ino Eva Kaluwa, reprezentantino de la tanzania diplomatia domo en Italio.

La kunveno grandparte kaj escepte enfokusiĝis pri la Aruŝa UK en 2024. John E. Magessa kaj Costantine Mashauri respektive sekretario kaj prezidanto de la Loka Kongresa Komitato (LKK) anoncis la kolorojn de la venontjara evento en la kontinento. Ili per lumbildoj faris prezentojn pri sia hejmlando Tanzanio, la lando de la 109-a UK. Iliaj prezentoj kaptis atenton de pli ol unu persono en la salono.

La sukceso de la reta elsendo estas plena merito de Francesco Maurelli. Kvankam la ideo pri hibrida kunveno leviĝis lastminute, li helpis aranĝi kaj persone okupiĝis pri la teknika aspekto. Tiel dank' al li homoj, kiuj pro iuj kialoj kaj aliaj ne povis fari vojaĝon al Torino, povis defore spekti la kunvenon.



Vendrede en Torino okazis oficiala prezento pri venontaj UK. Ĉe la afrika budo en la akceptejo estis montrataj memoraĵoj por donaco:

T-ĉemizoj, notkajeroj, ĉapeloj, flugofolioj pri la sekva UK kaj multaj aliaj interesaĵoj kun la emblemo de la 109-a UK.

Laŭ teksto de Adjé Adjévi en Torino (plej dekstre en la foto).

Kerna UN-laborgrupo pri lingvoj

La 12-an de junio 2023, la Komitato de Neregistaraj Organizoj (NROj) pri Lingvoj, kun la komitato de la Konferenco de NROj en Konsulta Rilato kun Unuiĝintaj Nacioj (konata kiel CoNGO) kaj la Studogrupo pri Lingvoj kaj Unuiĝintaj Nacioj, fakula reto de esploristoj kiuj specialiĝas pri multlingvismo, kune kun la Konstantaj Misioj de Andoro, Burundo, Ekvatora Gvineo, Ĝibutio, Hispanio kaj Kanado, kaj la Konstanta Observa Misio de la franc-parolantaj landoj, kunvokis specialan kunvenon kun gvidantoj de Unuiĝintaj Nacioj pri la temo ‘Konstrui reciprokan kompreniĝon pere de multlingvismo’. La kunsido estis multlingva, kun simultana interpretado en la ses oficialaj lingvoj de Unuiĝintaj Nacioj (la angla, araba, ĉina, franca, hispana kaj rusa).

Krome, Universala Esperanto-Asocio kunordigis provizon de interpretado en Esperanto, fare de la teamo Duncan Charters, István Ertl, Edmund Grimley Evans, kaj Adrian Tanner. Tiu Komitato, kies prezidanto kaj vicprezidanto estas respektive la reprezentantoj de UEA al Unuiĝintaj Nacioj prof. Francis Hult (kunordiganto) kaj prof. Humphrey Tonkin, estis la ĉeforganizanto de la kunveno.

Parolis pintaj gvidantoj de Unuiĝintaj Nacioj – s-ro Csaba Kőrösi, prezidanto de la 77-a Ĝenerala Asembleo de UN, s-ro Movses Abelian, la vic-sekretario por la Ĝenerala Asembleo kaj Kunordiganto de Multlingvismo; s-ro Miguel de Serpa Soares, Vic-sekretario pri Juraj Aferoj kaj Politiko, kaj s-ino Lisa M. Bottenheim, Asista Ĝenerala Sekretario pri Subtenaj Operacioj. La kunvenon alparolis UN-ambasadoroj: Ekscelencoj s-ro Zéphyrin Maniratanga, Burundo, s-ro Anatolio Ndong Mba, Ekvatora Gvineo, s-ro Mohamed Siad Doualeh, Ĝibutio, s-ino Ana Jimenez de la Hoz, Hispanio; s-ro Robert Keith Rae, Kanado, s-ro

Yuri Ariel Gala López, Kubo, s-ino Ana Paula Zacarias, Portugalio; kaj s-ino Ifigeneia Kontoleontos, konstanta observanto de la Internacia Organizo de la Frankofonio. Krome parolis s-ino Sofia Margaryan, konsilanto pri humanitaraj aferoj ĉe la Konstanta Misio de Armenio.

Esperantistaj parolantoj prof. Humphrey Tonkin de UEA, pastro Hans Becklin de TEJO, prof. Mark Fettes de la Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj kaj la Universitato Simon Fraser, faris siajn rimarkojn en Esperanto. Aliaj parolantoj uzis la araban, anglan, francan, hispanan kaj rusan.

Prof. Tonkin legis la anglalingvajn rimarkojn de d-ro Liberato Bautista, prezidanto de la Konferenco de NROj, CoNGO. La kunveno reprezentas la plej fortikan ĝisnunan utiligon de Esperanto en kunveno de gvidantoj kaj koncernatoj de Unuiĝintaj Nacioj.

Multlingvismo estas kerna al la laboro de Unuiĝintaj Nacioj. Ĝi efike plifortigas sekvadon de la celoj de Unuiĝintaj Nacioj, inkluzive de la Celoj por Daŭripova Evoluigo. Oni registris la kunvenon, kaj la video estos spektebla perrete.

100-a Germana Esperanto-Kongreso

La Esperanto-vivo en Germanio komencis organiziĝi jam relative frue: la klubo en Nürnberg (antaŭe volapükistoj) adoptis Esperanton jam en 1888, unu jaron post la apero de la “unua libro”. Sed la fondiĝo de tutlanda asocio daŭris ĝis la jaro 1906, kaj sian hodiaŭan nomon la Germana Esperanto-Asocio ricevis nur en 1909.

De la fondiĝo en Braunschweig ĝis hodiaŭ pasis 117 jaroj, kaj tamen la 26-29an de majo 2023 okazis “nur” nia 100a kongreso. Pri la mankantaj jaroj kulpas la du mondmilitoj kaj la malpermeso de ĉia Esperanto-agado dum la nazia periodo.

Kiel la naskiĝurbo, Braunschweig konservis apartan rolon por la germana Esperanto-movado. Tie okazis ankaŭ la 50-a GEK, la centa datreveno de la asocio en 2006, kaj nun do la jubilea kongreso. Jubileo

estas okazoj por festi, en ideala kazo ankaŭ por lerni el la historio kaj por fari planojn. Estis bona kongreso, kaj mi revenis el Braunschweig iom pli optimisma ol antaŭe.

Inkluzive la paralelan junularan renkontiĝon, partoprenis en la kongreso pli ol 200 esperantistoj el 13 landoj, inter ili UEA-prezidanto Duncan Charters kaj vicprezidanto Amri Wandel. Por la inaŭgura kunsido ni gastis en la festsalono de la antikva urbodomo: digna kadro, kiun ni eĉ sukcesis plenigi. Aliaj programeroj okazis en la salonoj de la junulargastejo (ĝin komplete okupis la kongresanoj) kaj en proksima salono de la ĉefa loka gazeto.

Post la inaŭguro kun salutvortoj de la urbo kaj UEA la enkondukaj prelegoj pritraktis la asocian historion kaj unu tre gravan aktualan aspekton de Esperanto. Pascal Dubourg Glatigny parolis pri la reapero de esperantistoj en Germanio (el kiuj pluraj aktivis en la rezisto kontraŭ la nazia reĝimo) post 1945, kaj Ilona Koutny pritraktis interkulturan komunikadon en Esperanto. La sukceson de ŝia instruprogramejo en Poznań ilustris ne laste grupeto de ĉinaj gestudentoj, kiuj partoprenis en la junulara parto de la kongreso.



Koncertas Kimo + Radio Mondo (Foto: Stefan Krieghoff)

Necesus ĉi tie nun listigi ĉiujn aliajn programerojn de la 100-a GEK, sed mi ne povus mem raporti pri ĉiuj. La kongreso – inkluzive ĝian plilongigan parton, kiun GEA unuafoje organizis kaj por kiu restis ĉirkaŭ 60 kongresanoj – daŭris tutan semajnon.

Sed multegaj eventoj okazis paralele, kaj mi aŭdis iom da bedaŭro, ke ne eblis sekvi ĉiujn. Ĉiu tamen povis ĉeesti la du festvesperojn: sabate kun koncerto de la kantistino Kjara el Italio, kaj dimanĉe kun prezento de loka dancgrupo (gajninto de pluraj naciaj konkursoj) kaj koncerto de Kimo + Radio Mondo. Bonŝance la loko sufiĉis ankaŭ por dancigi la kongresanojn, el kiuj multaj restis longe post la noktomezo. Dum la postaj tagoj en iom pli malgranda rondo koncertis kaj kabaredis Georgo Handzlik kaj Saŝa Pilipović, ambaŭ bone konataj en Esperantujo.

Kompare al pasintaj kongresoj ege abunda estis la ekskursiva programo: kvar gvidadoj tra la historia urbocentro, ekskursoj (ankaŭ biciklaj kaj boataj) al aliaj vidindaĵoj en la urbo, partopreno en urba festo de la Esperanto-urbo Herzberg dum la kongresa dimanĉo.

La plilongigo al tuta semajno ebligis pliajn ekskursojn: al la VW-fabriko en Wolfsburg, al la mezepoka urbo Goslar kun sia imperiestra palaco kaj al la apuda Wolfenbüttel – loko de kastelo kaj fama biblioteko, kiun iam estris Gotthold Ephraim Lessing. Bonŝance la suno brilis preskaŭ dum la tuta semajno.

Por la Germana Esperanto-Asocio la centa kongreso ankaŭ estis okazo fari iom da statuta laboro. La “Federacia Asembleo” (jarĉefkunveno), interalie, elektis novan estraron – ankaŭ novan generacion de estraranoj. Mi mem post la statuta maksimumo de ses jaroj forlasis la prezidantecon. Nova prezidanto fariĝis profesoro Martin Haase, bone konata al multaj el ni el GEJ kaj TEJO. La estraron forlasis ankaŭ nia trezoristo Matthias Hecking kaj mia edzino Barbara, kiu prizorgis la administradon.

Pri la kontinueco zorgos Andreas Emmerich kiel vicprezidanto, Andreas Diemel, Nils Brinkmann, Franz Kruse kaj Michaela Stegmaier. Novaj

estraranoj estas Reinhard Pflüger (jam duan fojon kiel trezoristo), Jean-Paul Kuhfahl kaj Steffen Möller. Nova reprezentanto de GEJ en la estraro (antaŭe Michael Vrazitulis) nun estas Jonas Schulz.

Por resumi mian sperton dum ses jaroj: estis multege da laboro, sed plej ofte valoris la penon. Kaj estis kuraĝige kunlabori kun teamo de simpatiaj kaj fidindaj gekolegoj. Al la posteuloj mi deziras sukceson!

Mi revenis el Braunschweig iom pli optimisma ol antaŭe, ne nur ĉar mi esperas nun havi pli da libertempo. Du impresojn mi volas aparte mencii, ĉar ili pli ol antaŭe evidentiĝis dum la nuna kongreso. Unue la junularan aranĝon KEKSO (mi ĉiam forgesas kion signifas tiu akronimo) kun aparta programo, sed nur ĉirkaŭ cent metrojn for de la kongresejo. Ĝi nun kreskis al pli ol tridek partoprenantoj – inkluzive la ĉinojn el Poznań, kiuj tie konatiĝis kun la koncepto de amasloĝejo. Por niaj kongresoj, kiuj ofte similas al kunvenoj de la tria aĝo, estas bone ke junularo kaj meza generacio fariĝas pli videblaj.

Due: jam dum pasintaj kongresoj ni ofertis Esperanto-kursojn por surlokaj komencantoj, sed kutime venis nur malmultaj. En Braunschweig la tutsemajnan kurson partoprenis 20 personoj el la tuta federacia lando Malsupra Saksio (kiu eĉ agnoskis ĝin kiel elekteblan por “kleriga libertempo”: tiom, ke necesis fari du grupojn kaj trovi plian instruiston).

Kongresoj estas nur momentoj en la vivo de asocio, sed ili donas la ŝancon montri, ke Esperanto restas aktuala. Ke tiu momento bone sukcesis, tion ni dankas antaŭ ĉio al LKK, preskaŭ la sama kiel lastjare en Oldenburg. Pri la centa nun ankoraŭ memorigas la specialaj poŝtmarkoj (jes: ili ankoraŭ validas kaj estas mendeblaj ĉe GEA) kaj paketo da jubileaj keksoj (minuskaj), kiujn ni konservas por taŭga okazo.



La 101-a GEK en 2024 estos komuna: ni jam antaŭĝojas pri la Eŭropa Esperanto-Kongreso en Strasburgo.

Ulrich Brandenburg en La Ondo de Esperanto

Novaj Honoraj Membroj de UEA

Laŭ la Regularo pri Honoraj Membroj, Honoraj Prezidantoj kaj Diplomato pri Elstara Agado, la Komitato de Universala Esperanto-Asocio (UEA), surbaze de propono de la Estraro de UEA, povas aparte distingi esperantistojn, kiuj faris gravajn servojn al la tutmonda Esperanto-movado, per la titolo Honora Membro (HM). Krome, kiel Honora Prezidanto (HP) povas esti nomumita esperantisto, kiu aldone havis eksterordinarajn meritojn por UEA.



Dum sia unua kunsido en Torino la Komitato elektis 3 novajn HM-ojn: Katalin Kováts, Anna Löwenstein kaj Privas Tchikpe. Aldone estis elektita unu nova HP: Renato Corsetti.

Sube sekvas resumoj de la vivpriskriboj, gravaj datoj, verkoj kaj/aŭ meritoj de la kandidatoj. Pli detalajn biografiojn ricevis la Komitato, arkivitajn en la komitata elŝutejo de UEA: uea.org/teko/komitato, kaj en Vikipedio.

Kováts, Katalin

D-ino Katalin KOVÁTS naskiĝis en Budapeŝto, la 16-an de oktobro 1957. Ŝi estas hungara esperantisto, pedagogo, lingvisto kaj instruisto. Ŝi estas fondinto en 2001 kaj redaktoro de la paĝaro Edukado.net; estis ano de la Akademio de Esperanto de 2007 al 2022; kaj Esperantisto de la Jaro en 2010. En UEA ŝi estas ekde 2009 la motoro de la Ekzamenoj laŭ la Komuna Eŭropa Referenckadro (KER-ekzamenoj) kaj same unu el la ĉefaj profesoroj de la Interlingvistikaj Studoj ĉe la Universitato Adam Mickiewicz. Ŝi verkis diversajn instruelajn verkaĵojn, inter kiuj furoras Poŝamiko. En 2005 ŝi tradukis la memtaksilon de la KER-

ekzamensesio kaj aperigis ĝin el la Manlibro pri instruado de Esperanto, kiun ŝi redaktoras. Ŝi estas dumviva membro de UEA.

Löwenstein, Anna

Anna LÖWENSTEIN naskiĝis en Britujo en 1951. Ŝi estas esperantisto, redaktoro kaj verkisto. Ŝi estis elektita Esperantisto de la Jaro 2019. Löwenstein laboris en la Centra Oficejo de UEA de 1977 ĝis 1981, kie ŝi redaktis la Jarlibron de UEA en 1981. Ŝi estis redaktoro de la facila parto de Kontakto (kaj krome verkinto de la listo de 1000 morfemoj uzataj en la facilaparto) de 1983 ĝis 1986. Ŝi estas membro de la Akademio de Esperanto ekde 2001. En UEA ŝi estas la fondinto kaj motoro de la Movada Foiro en la UK-oj. En 2019 ŝi kreis uea.facila.org, retejon kun mallongaj kaj facilaj artikoloj por novaj esperantistoj, kiun ŝi ĉefredaktoras. Ŝi partoprenis en pli ol 28 eldonoj de UK kaj estas membro de UEA de pli ol 40 jaroj.



Tchikpe, Privas

Privas TCHIKPE naskiĝis en Benino en 1963. Krom Esperanton, li parolas la aĝaan, la fonuan, la francan kaj la anglan. Li esperantistiĝis en 1981 kiel la unua esperantisto en Benino. Kun kelkaj amikoj siaj, al kiuj li instruis Esperanton, li fondis en la jaro 1983 la unuan landan asocion de Benino, Beninan Esperanto-Asocion, agnoskitan de la Ministerio pri Internaj Aferoj. En la jaro 2009 li fondis kun Mireille Grosjean el Svislando la asocion Scio



Sen Bariloj (SSB), neregistara organizo, kiu laboras por ebligi aliron al lertigado de homoj. Kerna agado de SSB estas la disvastigo de Esperanto kaj virina kapablo al gvidaj roloj. En 1991 li organizis kiel prezidanto de LKK sukcesan duan Afrikan Kongreson de Esperanto en Kotonuo, kun partopreno de dekoj da eksterafrikaj esperantistoj.

Renato Corsetti

Renato CORSETTI naskiĝis la 29-an de marto 1941 en Romo. Li estas esperantisto ekde la 1960-aj jaroj. Li havis multajn postenojn en la movado, estis interalie prezidanto de TEJO kaj prezidanto de la Itala Esperanto-Federacio. En UEA li deĵoris en la Estraro de 1980 ĝis 1986 kaj 1998 ĝis 2007, la lastajn ses jarojn kiel Prezidanto de UEA. En 1998 li estis elektita membro de la Akademio de Esperanto kaj ekde 2020 li denove anas en la skipo de lingvaj konsilantoj de Monato. Li verkis en Esperanto kaj en la itala pri lingva politiko, Esperanto, infana dulingveco, psikopedagogio de lingvo kaj komunikado. Li jam estas honora membro de UEA kaj honora prezidanto de TEJO.



Ĝis Torino estis 23 HM-oj, el kiuj neniu venis el Afriko (tiam 17 devenis el Eŭropo, 5 el Azio kaj 1 el Ameriko). La Estraro konsideris, ke per elekto de merita homokiel Privas Tchikpe la listo ekgajnas pli valoran diversecon. Same pri reprezenteco de virinoj inter la HM-oj: el la antaŭaj 23 HM-oj nur 3 estis virinoj. La elekto de meritplenaj virinoj kiel Katalin Kováts kaj Anna Löwenstein same kreskigas tiun reprezentcon. Tiuj aspektoj gravas por la tutmondeco kaj diverseco de UEA.

Rilate HP-ojn, UEA restis sen HP inter 1974 ĝis 2020, kiam la Komitato akceptis la proponon de la Estraro pornomumo de Humphrey Tonkin kiel HP de UEA. Antaŭe la Asocio havis paralele inter 2 kaj 3 HP-ojn. La Estraro konsideros meritplene kaj la Komitato akceptis do

nomumi ankaŭ Renaton Corsetti novan HP-on de UEA. Lia biografio mem tion pravigas, tamen estis des pli speciale, ke tio okazis dum UK en Italio, lia devenlando, kaj kiam oni agnoskis ankaŭ lian meritplenan edzinon, Anna.

La listo de nuntempaj HM-oj kaj HP-oj de UEA estas ĉe uea.org/asocio/honoraj_oficoj.

[gaz kom 1119]

UEA ricevis EU-subvencion

Universala Esperanto-Asocio (UEA) ĝojas anonci la aljuĝon de administra subvencio per la renoma programo Erasmus+. La subvencikadro kovras trijaran periodon, cele al plivastigo de la prioritatoj de la Asocio, kongrue kun la temoj de la programo Erasmus+.

La trijara projekta kadro firmiĝas en la intersekcio inter la ĉefaj prioritatoj de UEA kaj de la programo Erasmus+. La projekton orientas ampleksa laborplano, kiu referencas al la laboroj de la Komitato dum la Montreala Universala Kongreso. Ĉiu el la tri jaroj ricevas propran temon, por krei specifan fokusan direkton dum la projekto progresas:

- 2023: Jaro de daŭripova evoluo
- 2024: Jaro de interkultura kompetento
- 2025: Jaro de cifereca kompetento

La projekto fokusiĝas pri tiuj temaj aksoj por plifortigi la agadojn de UEA kaj krei sinergiojn kun iniciatoj landaj kaj lokaj. Por la jaro 2023, 140 000 EUR estis aljuĝitaj, dum por postaj jaroj la sumo dependos de la agadraportoj kaj de la kvanto da dungitoj.

Tiu ĉi sukceso kronas strategian agadon de UEA rilate al la programo Erasmus+, kiu komenciĝis fine de la jaro 2020. UEA ankaŭ kunordigas partneran projekton en la kadro Erasmus+, pri daŭripova transporto, kun aparta fokuso al trajnoj kaj bicikloj, kunlabore kun sia faka asocio IFEF kaj kun la faka asocio de TEJO, BEMI.

UEA partneras en pliaj partneraj projektoj: unu pri inkluziveco de blinduloj en Esperanto-agado, kunordigata de la Itala Asocio de Blindaj Esperantistoj; unu pri interkultura kompetento, kunordigata de Itala Instituto de Esperanto; krome, tria projekto, kiu ĵus komenciĝis, temas pri subteno al rifuĝintoj el Ukrainio, kunordigata de Bjalistoka Esperanto-Societo. Ĉiu partnera projekto havas buĝeton je 60 000 EUR.

Aparta prezento pri la plej progresintaj projektoj, ilia disvolviĝo kaj ĝisnunaj aktivajoj kaj atingoj okazis dum la Universala Kongreso en Torino.

Universala Esperanto-Asocio ĝojas pri la agnosko de sia agado per la aljuĝo de tiu ĉi grava subvencio; ĝi estas optimisma pri la sukceso kaj entuziasme rigardas al la estonteco por krei pli inkluzivan, interkulturan, kaj ciferecan movadon ene de sia tutmonda komunumo.

Por pliaj informoj kaj aktualigoj pri la projekto, bonvolu viziti nian retpaĝon ĉe www.uea.org.

Rezolucio de la 108-a UK

La 1318 partoprenantoj de la 108-a Universala Kongreso de Esperanto, kunveninte en Torino, Italio, inter la 29-a de julio kaj la 5-a de aŭgusto 2023, traktis la temon “Enmigrado – kunfluo de homaj valoroj”. La partoprenantoj, alvojaĝintaj el 69 diversaj landoj, ne nur diskutis la temon, sed spertis kaj vivis ĝin: ĉar ĉiuj partoprenantoj parolas la internacian lingvon Esperanto, neniam lingvaj baroj malhelpis interkomunikadon kaj efektive, konforme al la kongresa temo, la homaj valoroj de ĉiuj ĉeestantoj kunfluis – en harmonia etoso.

Multaj esperantistoj raportis pri propraj spertoj kiel migrantoj. Ili emfazis, ke la scio de la lingvo Esperanto ja helpas por ricevi subtenon en la komenco de nova vivo, sed esenca estas la lernado de la nacia lingvo de la koncernalando, por povi integriĝi en la socion.

Tio validas por ĉiuj migrantoj – ĉu ili libervole elektis translokiĝi al alia lando aŭ ĉu ili devis fuĝi el sia hejmlando pro milito, mizero aŭ persekuto.

Sekve, la kongresaj partoprenantoj notis jene:

1. La civila socio en la gastiganta urbo Torino donas modelan ekzemplon por la integriĝo de migrantoj kajprecipe rifuĝantoj en la socion.
2. Kun zorgo la kongresanoj konstatas, ke la nombro da rifuĝantoj en la mondo en la pasinta jaro unuafojesuperis la ciferon de 100 milionoj. Ni avertas, ke pro la klimatsanĝiĝo pli kaj pli da homoj estos devigataj forlasi sian hejmon.
3. Ni alvokas ĉiujn ŝtatojn de la mondo ĉesigi la kaŭzojn de malvolonta migrado kaj ni subtenas la klopodojn de Unuiĝintaj Nacioj kaj de la aliaj superŝtataj organizoj mildigi, se ne solvi la problemojn.
4. Ni apelacias al la ŝtatoj, kien venas rifuĝantoj, akcepti ilin kaj doni al ili ĉiun subtenon por povi establi memstaran, liberan vivon. Ni estas konvinkitaj ke migrado fine rezultigas pli riĉan kulturon kaj pli bonstatan socion en tiuj ŝtatoj mem. Ni agnoskas la historian valoron de migrado – migrado estas bazo por la evoluo dela homaro.
5. Ni apelacias al ĉiuj ŝtatoj garantii al migrantoj povi vivi sen lingva diskriminacio kaj sen ajna alia diskriminacio, alivorte: ni apelacias al ĉiuj ŝtatoj sekvi la Universalan Deklaracion de Homaj Rajtoj proklamitan en la jaro 1948.
6. Nun, en la jaro de la 75a datreveno de la akcepto de la Deklaracio de Homaj Rajtoj, ni konstatas kun zorgoke tiuj rajtoj ne estas respektataj en multaj partoj de la mondo.

7. Tial ni estas solidaraj kun rifuĝantoj kaj ni emfazas, ke la Homaj Rajtoj estas universalaj rajtoj kiuj validas por ĉiu individuo tutmonde, ankaŭ por migrantoj.

Torino, Italio, 5 aŭgusto 2023

[gaz kom 1118]

Ĵurnalista seminario en Litovio

Ĉi-jare la organizado de la ĉiujara tradicia seminario de esperantistoj-ĵurnalistoj transprenis Litova Esperanto-Asocio (LEA), kiu okazigis ĝin en nova loko kaj en la tradicia tempo. Do, la 16-a seminario okazis de-nove printempe la 20-21-an de majo 2023 en agroturismejo en la vilaĝo Antalkiai, 26 kilometrojn for de Kaŭno. Ĝin partoprenis 45 esperantistoj el dek urboj de Litovio kaj el Islando.

La organizantoj strebis aranĝi ĝin programe kaj organize tiel, kiel ĝi okazis dum multaj jaroj. La kondiĉoj por laboro kaj ripozo estis luksaj. Krome, al bona etoso kontribuis bonega printempa vetero.

Dum la solena inaŭguro parolis la prezidanto de Litova Esperanto-Asocio Povilas Jegorovas, emfazinta gravecon daŭrigi la jam ekzistantan tradicion, kaj la multjara organizanto de pli fruaj seminarioj Vytautas Ŝilas.

Fakulo pri komunikado kaj publikaj rilatoj Linas Kontrimas konatigis la partoprenantojn kun problemoj de veraj kaj malveraj novaĵoj en la nuna publika komunikado kaj kiel distingi tion.

La ĉefa programero estis prezentado de la ĵus aperinta granda Esperanta-litova vortaro de Petras Čeliauskas (816 paĝoj, 52000 vortoj). Al ĝi venis ankaŭ ĝia aŭtoro, la 94-jara veterano de la litovia Esperantomovado Petras Čeliauskas. Pri la problemoj por aperigi ĝin parolis Povilas Jegorovas. La direktoro de la Monda centro de litovoj Valdas Kubilius rakontis pri defio eldoni la vortaron en mallonga tempo por sukcesi por la ĵurnalista seminario. La aŭtoro rakontis pri sia laboro kaj

pri daŭre verkataj aliaj libroj. Esperantistoj, kiuj finance kontribuis eldonon de la verko, ricevis senpage po du ekzemplerojn de la vortaro. Aliaj povis aĉeti ĝin kun grava rabato. Eblis ricevi subskribon de la aŭtoro.

Sekvis renkontiĝo kun la fama litova pentristo, karikaturisto, humoristo Vladimiras Beresniovas, konata kiel Vlaberis, kun kiu LEA kunlaboras dum multaj jaroj, kiu ilustris multajn librojn, kiujn eldonis LEA, projektis kovrilojn de tiuj libroj. Estis organizita ekspozicio de liaj pentraĵoj.

Vespere bonegan koncerton prezentis la violonistino Sigita Railaitė-Sičiūnienė, kiu speciale por la seminario venis el Islando, kie ŝi nuntempe loĝas. Sekvis ĝis la noktomezo komuna kantado de popularaj Esperanto-kantoj kun gitara akompano de Vytautas Šilas. Dezirantoj povis uzi banejon.

Dimanĉe ĉirkaŭrigardan ĝisdatigan prelegon pri evoluo de Esperantomovado en la mondo ekde ĝia komenco ĝis nun faris Sigita Barniškienė, profesorino de la Kaŭna universitato Vytautas la Granda. Gražina Opulskienė el Mažeikiai interese rakontis pri sia aprila vojaĝo al Israelo kaj partopreno en ties esperantista kongreso. Tiun ĉi kongreson partoprenis ankoraŭ du esperantistinoj el Litovio – Laima Vilkelytė kaj Rasa Mišeikytė. Okazis ankaŭ tradicia Esperanto-kvizo, kiun gvidis Vytautas Šilas. Tiuj, kiuj ĝuste respondis demandojn de la kvizo, ricevis valorajn librodonaĵojn. Dum la tuta seminario funkciis riĉa libroservo.

Dum la fermo de la seminario estis diskutita la demando: ĉu ni daŭre organizu tiun ĉi aranĝon, kaj ĉu ĝi daŭre titoliĝu ĵurnalista, ĉar plejmulto de la partoprenantoj ne estas profesiaj ĵurnalistoj? Estis decidite aranĝi du semajnfinojn de litovaj esperantistoj jare – unu printempe en majo, la alian aŭtune en septembro. Ĉi-jara aŭtuna semajnfino de litovaj esperantistoj okazos en la sama loko la 23-24an de septembro.

Povilas Jegorovas en La Ondo de Esperanto



La danaj partoprenantoj de la UK en Torino



Oficiala komuna foto